

HEJES

BULTENO DE LA HISPANA ESPERANTO - JUNULARA SEKCIO

Nro. 12

Junio 1960




REDAKTORO: Sro. José María Cuñat

Sto. Valseca, 32, 1.º, 2.º Barcelono (*Hispanujo*)



Ciisés ROLDAN

La samideanoj Dandorfer kaj kast en la grupo "Fomento Excurcionista" (foto 1.ª) kaj en la placo de nia tipa "Taürobatalado" (foto 2.ª). Ambaü estas de Weiten - germanio.



PRI LA VIZITO DE S-ANOJ EL WEIDEN

Dum la lasta semajno de majo, estis en Barcelona, du germanaj samideanoj el Weiden; s-roj Dandorfer kaj Kast.

Aparte liaj gastigantoj, mi estis kiu pli kunvivadis kun ili kiel akompananto al la vizito de la plej interesaj miriandaĵojn kaj spektaklojn el nia urbo. Tiam kunvivado estis tiel agrabla ke ili gajnis mian sinceran korplenan estimon ĉar ilia konduto estis en ĉiuj aspektoj korekta kaj inda, ĝis lasi ĉe mi neforgeseblan rememoron. Pro tio mi volas dediĉi tiun ĉi raporton pri ilia neforgesebla restado ĉe ni. Tamen, ĉar lia gastiginto ne permesas min publiki alian nomon, mi mencias lin nur pere de lia antaŭ nomo: Jo zefo.

22-V-1960: Je la 2-a kaj duono alvenas al nia urbo, la samideanoj Dandorfer kaj Kast. Jozefo ricevis ilin ĉe la Stacidomo el la fervojo. Nokte, ĉe la placo Urquinaona ili estis prezentitaj al mi. Tuj post la prezentiĝo ni promemis ĝis la "Plaza Real" kie estas tre famkonata loko trinki bieron kaj situas flanke de niaj tipaj bulvaroj "Ramblas".

23-V-60: Frue matene, mi akompanis alin tra nia ĉefa kaj plej eleganta promenejo "Paseo de Gracia"; tie mi montris al ili du elstaraj konstruaĵoj de nia fama arkitekto Antonio Gaudí. Sekve estis vizitata la "Guell Parko" tre originala kaj ankaŭ verko de Gaudí. De la supra parto de tiu parko, ni rigardis belegan panoramon sur la urbo kaj la samideano Kast faris la unuaj fotoj, ĉiam malrapide kaj pro tio, certe mirindajn.

Posttagmeze okazis vizito al nia grava kaj belega "Zoologan Gardenon" kie samtempe ke ni rigardis la bestojn oni diris humoraĵojn kiujn estis ĉiam riditaj de ĉiuj ni, pruvo de nia bonhumoro kaj simpatio. Poste de tio, ni vizitis la havenon, vojaĝis tra ĝin en publika malgranda ŝipo ĝis la limo de la maro, k.t.p. Tuj post la reveno, ni sidis en trinkejo, ĉe tablo sur la strato meze de nia tipa bulvarado "Ramblas" kaj ripozis trinkante samtempe oranĝaĵom. Fine okazis vizito al la Esperanto-Kurso de la societo "Fomento Excursionista de Barcelona" kion estis kaŭzo de ĝoja surprizo por la lernantoj. Oni faris foto de la tuta grupo kun la vizitantoj.

24-V-60: Posttagmeze okazis partikularaj vizitoj ĉe la placo España. Profitante la proksimecon, ni vizitis la eksteraĵojn de nia grava kaj tiam inaŭgurata Oficiala kaj Internacia - Specimenfoiro en kies oficejoj ni petis esperanto afiŝojn - pri la foiro. Nokte, ni kun la familianoj de ilia gastiganto Jozefo, ĉeestis en tipa hispana spektaklo en la teatro "Victoria".

25-V-60: Posttagmeze ni vizitis ĉe Montjuito, la tipaj konstruaĵoj el "Pueblo Español" (La hispana popolo) kio estas - arego da domoj, stratoj, placojn, k.t.p. reproduktante la plej tipajn el Hispanio. Nokte, okazis en la grupo "Stelo de Paco" prezentiĝo kaj projekcio de diapozitivaj pri belegaj - konstruaĵoj kaj pejzaĝoj el Bavarujo kaj Weiden. Ĝi ŝatis - treege kaj je la fino, la ĉeestantojn aplaudis premiante tia maniere la interesa kaj belega projekciado de la artaj lum - bildoj de s-ro Kast.

26-V-60: Tiu tago, okazis ĉeesto al la plej tipa hispana - spektaklo, la "Taŭro-Batalo" kion rezultis pleninteresa.

Ni situis nin tre proksime de la "placo" kaj sub teruraj sunradioj. Estas rakontinda ke en tiu okazo, okazis preskaŭ ĉio kion povas okazi en tiu spektaklon; bonegaj kaj bravaj taŭtoj; kuraĝaj taŭristoj; unu taŭristo devis esti retirita pro vundaĵo kulpe de taŭro; alia ricevis batado kaj la taŭro ŝiris sian pantalonon; unu taŭro estis retirita pro ĝia malbraveco; k.t.p. La publiko akompanis la "artan" laboron de la taŭristoj pere de krioj "Ole!!" "Ole!!" kaj varme aplaudis. La amikoj Dandorfer kaj Kast treege ankaŭ entoziasmiĝis, tiel ke la s-ro Kast fine decidis salti al la placo - por "taŭro-batali", tamen kiam li tion decidis jam estis tro malfrue, ĉar jam ne restis taŭrojn.....!!! Tamen li kaj Dandorfer kriis ankaŭ "Ole!!" "Ole!!" kvazaŭ hispanoj.

27-V-60: Dandorfer kaj Kast, kune kun Jozefo, vizitis la faman vilaĝon Sitges. Tie ili estis la tutan tagon kaj eĉ na - ĝis en la maro ĉe ĝia bela strando.

28-V-60: Alia interesega ekskurson. Vizito al impona kaj mirinda manaĝejo de "Nia Sinjorino el Montserrat" inter strangajn montojn kaj sur emociaj pejzaĝoj kaj panoramoj.

29-5-60: Matene de tiu tago, kune kun la familio de Jozefo, la germanaj samideanoj vizitis la mont-parke Tibidabo, la - alta "rigardejo" sur nia urbo, en sanega atmosfero kaj multaj mirindaĵojn.

En la hejmo de Jozefo, lia gastiganto, kaj post la tagmanĝo, okazis familian kunvenon, oni kantadis, oni trinkis likvoroj, k.t.p. motive de la tuja adiaŭo. Fine, neeviteble alvenis la malgaja momento je adiaŭi, kion okazis - unue kun la familianoj de Jozefo, ĉar li kaj mi, akompanis la germanajn gastojn al la Stacidomo kie post malmultaj minutoj ni devis definitive adiaŭiĝi. S-roj Dandorfer kaj Kast invitis nin iri venontan jaron al Weiden. Ni tre dankas la inviton. Espereble ni havos la plezuron renkontiĝi de-nove - aŭ en Weiden aŭ ĉefe okaze de la Internacia Kongreso de Esperojistoj en Barcelona, la venontan jaron. (Por tiam, amiko Kast, mi prizorgos preti unu grandan kaj bravan taŭron, por ke vi povu taŭrobatali....!!). Fine nur unu frazo: restas - ĉe ni, de via restado, neforgeseblan rememoron.

J, Ma CUNAT.

=====

NOTAS VARIAS - VARIAJ NOTOJ

=====

AVISO IMPORTANTE A LOS HEJS-DELEGITOS: Se ruega a todos los delegados de HEJS, que envíen al redactor su foto-carnet, en tamaño "pasaporte". Dichas fotos serán publicadas en nuestro boletín, todas juntas. Preparen así mismo un resumen de las actividades más notables del tipo esperantista, que haya tenido lugar en su localidad. (cursos, visitas, de extranjeros, conferencias, actos importantes, y cuanto se crea de interés). Todo ello debe enviarse al redactor, antes del día 15 de julio próximo.

Broŝuro titolita "ESEJO PRI LA DINAMIKO DE LA ESPERANTA VORTPARADO" aperis en Toulouse. Ne estas necese diri ion pri intereseco de ĝia enhavo, ĉar la nomo de ĝia aŭtoro estas la plej bons garantio. Vi povas ĝis ricevi rekte de la aŭtoro, sendante 3 rpk. al D-ro André Albault- 8 Avenue Etienne Billieres- TOULOUSE, Francio.

Hemos recibido de nuestra gentil delegada de Tarrasa, Srta. Adelaida Marcet, el boletín "Esperanto-Fako" de la S.C. Juventud Tarrasense. Gracias.

DEZIRAS KORESPONDI: Kun jumilá hispana samideano, F-ino Nerinjo Kalandrova. Dobrovského, 46. BRNO-12. Ĉeĥoslovakio.

I N F O R M A C I O N

Durante una semana fueron huéspedes de un destacado dirigente de Instituto de Esperanto, dos samideanos alemanes. Se trata de los señores Dandorfer y Kast, de Weiden, los cuales y ante numerosa concurrencia, ofrecieron en el salón teatro de la Cooperativa de Tejedores a mano, y bajo el patrocinio del grupo esperantista "Stelo de Paco" una proyección de maravillosas dispositivas en color sobre monumentos y paisajes de Baviera. Al final de la proyección se aplaudió cariñosamente a nuestros samideanos alemanes, por la brillante velada ofrecida.

El 20 de abril pasado se unieron en matrimonio, el Sr. Carlo Fighiera, alto funcionario de U.E.A. (italiano) con señorita Ada Sikorska, exredactora de la Radio Polaca para las emisiones en Esperanto.

La dirección de los Ferrocarriles Yugoslavos ha decidido incluir dos páginas en Esperanto, en las guías sobre horarios y rutas. Es el tercer país que lo hace.

Durante Junio y Julio, la emisora "La Voz de América" continuará sus emisiones en Esperanto, en vista del éxito que han obtenido hasta ahora.

El Congreso Español de Esperanto, a celebrar del 21 al 23 de julio próximo, en Pontevedra, promete ser un éxito.

Aparte los muchos alicientes panorámicos y folklóricos que brindará a los congresales, se anuncian conferencias a cargo de elementos tan notables como el Dr. M. Solá, que disertará sobre "El Dr. Fleming"; el Rvdo. P. Casanovas predicará en Esperanto; y el Sr. Alfonso del Real, vicedecano de la Facultad de Filosofía y Letras de Santiago de Compostela, que será este año el encargado de la conferencia en español. Se anuncia también una numerosa asistencia de esperantistas portugueses.

Unos samideanos australianos, los s-res Taylor, visitaron la vecina ciudad de Sabadell, donde participaron en una excursión a "Font de la Tosca". Por la noche tuvo lugar en el local del grupo, un coloquio, contestando el Sr. Taylor cuantas preguntas se le hicieron sobre su país y ofreció además una interesantísima proyección de dispositivas en color.

El día 29 de mayo pasado, tuvo lugar en el local del grupo "Esperanto-Fako" de Sabadell, un coloquio que a base de preguntas y respuestas sobre Alemania, dió el esperantista de dicha nacionalidad, Sano Link. La concurrencia y participación a dicho coloquio fué numerosísima.

Pródigas han sido las últimas semanas, en visitas de samidenos extranjeros. El día 17 del corriente mes tuvo lugar una proyección de diapositivas en color sobre Nueva Zelanda, en el Instituto de Esperanto, a cargo del sano A.G. Wiltshire, vic-delegito de UEA en Auckland. N.Z.

Con motivo de la pronta terminación de los cursos de Esperanto, y como colofón de una brillante campaña, se prepara en Tarrasa, una Fiesta de fin de Curso.

=====

LA LINGVO KIU UNUIGAS

"Sub la supra titolo aperis an la usona anglalingva revuo CORONET granda artikolo pri Esperanto, skribita de Stanley S. Jacobs. El tiu artikolo ni ĉerpas la sekvantajn.

En malproksima persa vilaĝo, D-ro A.P. Anthony el Cikago troviĝis iam meze de trupo de ribelantoj, armitaj per pafiloj, klaboj kaj tranĉiloj. Sed antaŭ ol iu povis ataki lin, unu kapitano sur ĉevalo alrapidis, liberigis lin el la danĝera situacio kaj akompanis lin al sendanĝera loko.

La kapitano montris al la verda kvinpinta stelo sur la vesto de D-ro Anthony kaj ridante diris.

- Ankaŭ mi estas esperantisto; ni tagmanĝos kune. Mi ne havas multan okazon por paroli Esperanton en ĉi tiu regiono.

"La verkinto menciis ankaŭ alia interesan kazon:

Kiam la germana esperantisto D-ro Walter Lippmann el Leipzig devis forkuri pro la Gestapo, li povis atingi Svielando helpe de esperantistoj, kun kiuj li antaŭe korespondis. De scislando li iris al Hispanujo, kie aliaj esperantistoj kore akceptis lin. Usonaj esperantistoj sendis al li monon por la vojaĝo al Ameriko, kaj en Novjorko atendis lin sur la kajo esperantistoj kun verdstelaj rubandoj sur la maniko; ili akompanis lin al hotelo kaj trovis oficon por li.

(Transkribitaj el "La Praktiko")

En altlernejoj la gelernantoj ne lernas vortojn, sed "vokablojn". Versajne (probable) la instruistoj intence aŭ neintence volas eduki la altlernejanojn al fremdvortlingvo, al klasa lingvo, por diferenciĝi de la parolantoj de popola lingvo. Kiam mi legis en la Esperanto-Revuo numero II/58 - la vorton "vokablo" mi estis ŝokita, precipe ĉar la aŭtoro de la artikolo "Dangera Eŭropanismo" kontraŭas la superflujajn vortnovaĵojn. La vorto "neologismo" estas forigenda el nia vortaro, ĉar en Esperanto ne ekzistas la vortradiko "logos" kaj "nova vorto" aŭ "vortnovaĵo" sufiĉas. Eĉ la vorto "esprimo" estas superflua kaj la vorto "termino" (ter-mino) forigenda kvankam, ĝi estas oficiala. Ni nepre kontraŭbatalu superflujajn duoblajn vortojn por unu ideo kaj la evoluon de fremdvortlingvo en Esperanto.

Ni ne enkonduku kaj uzu anglajn vortojn kiel "mapo" por "landkarto" kaj diru anstataŭ la ridinda vorto "teamo" (te-amo) sportularo, ludantaro, aŭ eĉ mur ularo.

Se la lingva akademio restas muta aŭ mallaborema ni esperantistoj agu kaj gardu nian lingvon. Umflanke ni konstatas la uzadon de novaj adjektivoj anstataŭ de malnovaj adjektivoj kun la prefikso mal, sed aliflanke, mallertan esprimmanieron per la traduko de la germana vorto "erst" per "mur", kiu vorto devus esti uzata mur por la ideo "ne pli ol" aŭ "ne alie ol". Ni uzu "ne pli frue ol" aŭ "mal- jam".

Tre laŭdinda estas la strebado al vere esperantaj vorttradukoj en la "Aktuaka Terminareto" de nia estimata saŭmideano Hans Wingen en la Esperanto-Revuo.

(El la "Pola Esperantisto")

Erwin Preibisch
Köln-Brück

KATALUNA POPOLKANTO

La Paŝtistineto
(danco)

Kion donos ni al paŝtistineto ?
Por iri al danc' , kion donos ni ?
Mi al ŝi donacus unu kapuĉeton
kaj en la monteton ŝin kondukus mi.
Nek pluvo nek neĝo falas sur montet' ,
kaj la vento ĉion movas en l' eben' ,
en la ombreto, l' ombreto, l' ombret' ,
floroj, violoj kaj rosmaren'.

L A C E - M E T O D O

=====

Jam de la jaro 1920 s-ro Andreo Ce kaj centoj da aliaj geinstruistoj gvidadas Esperanto-kursonj laŭ la nun jam famiginta metodo, de li ellaborita. Fakte estas, ke la Ce-metodaj kursoj ĉie havis kaj ankoraŭ havas tiel grandan sukceson, ke la plej multaj fimiĝas kun pli da lernantoj ol en la komenco. -- Kio estas la sekreto de tiu sukceso ?

Unu el la principoj de la metodo estas, ke fremdlandano domu la kurson. Tio devigas la instruiston paroli Esperanton de la unua leciono. Tial li bezonas multajn demonstraĵajn objektojn, kiuj vivigas la instruadon. En la unuaj du aŭ tri lecionoj la instruisto uzas kelkfoje tradukanton, sed poste ĉiuj vortoj estas klarigataj pere de la jam instruitaj vortoj.

Verdire la kurslecionoj ne estas lernejoj laŭ la ĝenerala signifo de la vorto, sed li estas agrablaj konversacioj kun la lernantoj. La instruisto faras demandojn, -- kaj la lernantoj respondas ĝoje. Tio havas la grandan avantaĝon, ke ankaŭ la lernantoj jam tuj de la komenco uzas la novan lingvon, kaj en la kurso povas partopreni grandnombra lernantaro. Tre grava postulo estas, ke ĉiu lernanto fervore respondu. S-ro Ce certigis tion per siaj spritaj demandoj, -- kiuj vekas grandan atenton kaj kreas bonhumoran sferon.

Lernolibro ne estas uzata. La gramatiko estas demontre -- trata per ekzemploj, tiel ke la lernantojn ne bezonas lerni la oficialajn momojn de la gramatikaj elementoj. Ĉi tio povas okazi en la daŭriga kurso, en kiu oni ankaŭ -- uzas lernolibron. La spertoj montris ke la instruisto daŭre tenas la atenton de siaj lernantoj, kaj ke neniu post kelkaj lecionoj forlasas la kurson.

La tuta kurso daŭras 40 horojn, kiujn oni povas dividi laŭvole. La metodo baziĝas ĉefe sur la principo paroligi la lernantojn, tiel ke ili post la finiĝo de la kurso povu fari simplan konversacion. Guste tio tre entuziasmigis ilin, kaj instigas ilin sekvi ankaŭ daŭrigan kurson por perfektigi en la lingvo.

GRAVA AVIZO AL HEJS-ANOJ

Gis la monato aŭgusto ne reaperos HEJS-bulteno. Tiam ni publikigos julia-aŭgustan ekzempleron.

La Redaktoro.

HUMORAJOJ

- LI NE PLU KURAGIS: Mi kondamas vin al pago de dek gulde -
noj pro ofendo de la plendinto.

Cu vi deziras diri ankoraŭ ion, akuzito ?

: Certe, sinjoro juĝisto, sed tio sendube kostus multe pli.

- ENIGMA SURSKRIBO: La parencoj mendis grandan funebran --
florkronon, ornamitan per rubando, kiu devos porti jenan --
surskribon: "Pace Ripozu"--"gis revido". Poste oni diskutis --
pri la teksto en la familia rondo, jak decidis ion el ili --
telefonis kun la floristo:

- Bonvolu aldoni sur la rubando: "en la ĉielo" se ankoraŭ --
estas loko.

- Mi prizorgos tion, sinjoro.

Dum la enterigo oni povis legi jenen enigman surskribon: --
"Pace ripozu-Gis revido en la ĉielo se ankoraŭ estas loko.

- LA ERARO: Konfesantino akuzas sin, ke ŝi dum longa tempo
rigardis en la spegulo, kaj trovas sin vela.

La konfesanto rigardas la fraŭlinon kaj diras:

- Ne maltrankviliĝu, filino mia, tio ne estas peko, sed Era
ro.....

=====

EL ESPERANTO Y LA ACADEMIA " C C C "

=====

Ha nuestra redacción han llegado unos rumores, que de con --
firmarse supon^{drían} un motivo de enorme satisfacción para
los esperantistas, y un triunfo para el esperantismo. Se --
trata de que han llegado a nuestros oídos, rumores en senti
do de que la prestigiosa Academia de Cursos por correspon --
dencia, CCC incluiría posiblemente el Esperanto entre los --
muchos cursos que dicha entidad tiene en su programa de ense
ñanza. De confirmarse tal rumor, lo celebraríamos sincera --
mente, tanto más, cuanto que la mencionada entidad goza de
un prestigio y fama que va más allá de los límites naciona --
les; para ser concretos diremos que nos consta que tal Aca
demia tiene alumnos por ejemplo en Francia. También podemos i
informar de que en uno de sus magníficos boletines mensua --
les (del Club CCC) últimamente apareció un extenso artículo
sobre el Dr. Zamenhof y el Esperanto.